

# SUDFRANCIA STELO

Bulteno de la Esperanto-Federacio "LANGUEDOC-ROUSSILLON"  
Jarabono: 25 F al Fédération d'Espéranto du Languedoc-Roussillon

CCP 956-28 P Montpellier - N° 120 - 4a kvaronjaro 1992

\*\*\*\*\*

De plus en plus fréquemment, la presse mentionne le problème linguistique en Europe et la solution de l'ESPERANTO. "La Nouvelle République" a consacré une bonne partie de sa 1° page au courrier des lecteurs sur ce sujet. Vous trouverez ci-dessous un extrait de "La Marseillaise" de Béziers du 17 Janvier. Mme Maurel, qui n'est pas (encore) espérantiste, dit tout haut ce que beaucoup pensent : sans langue commune, l'Europe ne vivra pas.

France Culture diffuse prochainement une série d'émissions sur l'Esperanto dont le caractère exceptionnel ne vous échappera pas. Notez bien l'horaire et les dates des émissions et soyez à l'écoute!

Informez aussi vos amis, la presse locale etc ! VIVU ESPERANTO !

## L'Europe de la parole

**J**OURNAUX, télévisions, discours... on ne nous parle que de l'Europe : Europe économique, politique avec ses heurts, ses malheurs et, espérons-le, ses bonheurs. Nous avons même une monnaie commune : l'écu.

Peut-être parlerons-nous d'escarcelle et non plus de porte-monnaie, mais j'espère qu'il y aura plus d'écus dans l'escarcelle du chômeur ou du RMIste qu'il n'y a d'argent, à l'heure actuelle, dans son porte-monnaie.

La suppression des frontières, l'écu européen, vont faciliter nos relations, nos déplacements, nos échanges. C'est sûr. Mais à quoi nous servira-t-il de voyager sans passeport si nous sommes incapables de demander notre chemin, de faire des achats, de communiquer avec les autres. Sans langue commune, il ne peut exister qu'une Europe de sommet. Nos dirigeants disposent de traducteurs et cela leur permet de s'entendre pour, comme on disait autrefois, "plumer la volaille".

N'acceptons pas d'être des volatiles passifs, nous devons réclamer une langue qui nous permette de nous défendre, nous, les citoyens européens.

L'édification de l'Europe est longue, très longue. Elle se met en place, et les enfants d'aujourd'hui la poursuivront et la vivront.

Et c'est à eux qu'il faut en priorité donner une langue. Cette langue existe et si elle est artificielle, elle a le mérite d'être simple, de n'appartenir à aucune nation, et l'espéranto est facile à apprendre et à utiliser.

Langue neutre, en l'adoptant on ne blesse aucune susceptibilité nationaliste.

Dans les écoles, les établissements scolaires, on enseigne diverses langues étrangères. Puisque les élèves sont des Européens en puissance, donnons-leur une langue européenne, ciment véritable de l'Europe des hommes.

A cette seule condition existera l'esprit européen. Et ce n'est pas renoncer à notre propre langue que d'en vouloir une commune. C'est au contraire la préserver, la défendre contre "l'envahisseur anglais". Depuis que les politiques se réunissent pour bâtir l'Europe, jamais ils n'ont parlé d'une langue. C'est bien le signe qu'ils n'en veulent pas, de peur de ne plus être les seuls maîtres de notre vie.

Réclamons cette langue, mettons-la en place, car sans cette parole universelle, intelligible à tous, nous subissons notre avenir, nous n'en serons pas les maîtres.

J. MAUREL



## L'Esperanto sur France-Culture

DANS LE CADRE DE SON EMISSION :  
LES CHEMINS DE LA CONNAISSANCE

de 10h 40 à 11h

13 AVRIL

### Historique

par Pierre Janton, Université de Clermont-Ferrand, professeur agrégé d'anglais, auteur du "Que sais-je" n° 1511 sur l'espéranto

14 AVRIL

### Nécessité d'une langue internationale

par Claude Piron, Université de Genève, ancien traducteur de l'ONU et de l'OMS

15 AVRIL

### L'espéranto dans le monde

par Claude Gacond, animateur des émissions en espéranto de Radio Suisse Internationale, lauréat de la fondation FAME

16 AVRIL

### Aspects linguistiques de l'Espéranto

par Michel Duc-Goninaz, professeur de russe à l'Université d'Aix-en-Provence

17 AVRIL

### L'espérantisme et les espérantistes en France

par Henri Masson, secrétaire général de SAT-Amikaro, rédacteur d'Espéranto-Informations



16-17 Mai 1992 : Congrès fédéral à Montpellier - La Paillade.

27-31 Mai 1992 : Stage d'espéranto - plusieurs niveaux - à Agde.

Ni kalkulas je via partopreno !

# Nia federacia kongreso.

16-17 V

Alproksimiĝas la dato de nia federacia kongreso en Montpellier-La Paillade. Niaj gesamideanoj en Montpellier preparis/as ĝin kaj atendas viajn aliĝojn. Ne forgesu, ke teorie la 15a de Aprilo estas la limdato por aliĝi. Kompreneble oni akceptos vian aliĝon ankaŭ post tiu dato sed, ju pli frue vi aliĝas, des pli vi faciligas la organizadon. La programo restas sensanĝa en la grandaj linioj. Michel CAVELAN (Nice) venos por ĉarmi vin gitare; estos debatoj, teatraĵetoj, lumbildoj, muziko, prezento de E° per komputilo, ktp. Funkcios libroservo. Kelkaj trapasos ekzamenojn. Dimanĉe vi povos malkovri piede la malnovan centron de la urbo. Dimanĉmatene okazos la ĝenerala kunveno; ni daŭrigos la bonan laboron komencitan en Sète en Septembro 91. Venu kun viaj sugestoj ... kaj via preteco helpi al la efektivigo de kelkaj el ili. Ni bezonas novajn ideojn... kaj homojn por ili, realigi. UFE invitis nin okazigi la nacian kongreson en nia regiono. Ni proponis 94, ĉar ni ne estas pretaj por 93. Ĉu vi-mem, kiu legas tiujn liniojn, estus preta respondi pri tasketo? Kune ni certe povas fari ion tre pozitivan... Se vi ne solvis la loĝproblemon pri la baldaŭa kongreso, relegu la antaŭan numeron de SFS, aŭ petu liston de la turismoficejo, aŭ kontaktu L. Ensuque. Ne restu izolita esperantisto; konatiĝu kun aliaj esperantistoj, komparu viajn spertojn. Iu certe helpos vin, se vi tion bezonas. Federacia kongreso okazas nur unufoje en la jaro. Vi estas atendata en Montpellier. Ĝis !

J.H.



LANGVEDOK - RUSILJONA ESPERANTO - FEDERACIO

KONGRESO : 16-an kaj 17-an de majo 1992  
 Centre Social des Allocations Familiales 410, Av de Barcelone 34080 MONTPELLIER  
 (Quartier de La Paillade , Tel:67 75 36 93)

ANTAŬVIDITA PROGRAMO

Sabaton 16-an	14-a h	: Akcepto de la kongresanoj
	15-a h	: Ekzamensesioj
( samtempe (	16-a h	: PORESPERANTISTA libera diskuto: spertoj pri instruado, informado de neesperantistoj, ktp...
(	16-a h	: Por NEESPERANTISTOJ, prezento de kaj iniciado al E-o. Pour les NON ESPERANTISTES, présentation et initiation à l'Espéranto
	19-a h	: Vespermanĝo en memserva restoracio
	21-a h	: Distra vespero (teatraĵetoj, ĥoro, kanzonoj)
Dimanĉon 17-an	9-a h 30	: Ĝenerala kunveno
	12-a h	: Tagmanĝo en restoracio
	14-a h	: Gvidata vizito piede de la urbo

\*\*\*\*\*

ALIGILO resendota antaŭ la 15-a de aprilo al :  
 Louis ENSUQUE 7, Rue Gustave 34000 MONTPELLIER


NOMO, ADRESO, TELEFONNUMERO: \_\_\_\_\_

ALIGO : 50 F unuope do senpaga por studentoj kaj eksterlandanoj.	50 F	x	_____	=	_____
VIZITO de la urbo ( dimanĉe posttagmeze )	30 F	x	_____	=	_____
TAGMANĜO ( dimanĉe tagmeze )	80 F	x	_____	=	_____
	S U M O : _____				

Ĉeko nome de Centre Culturel Esperanto n° 1487 48 D Montpellier, sendota kun la aliĝilo.

# Kongresejo

Por atingi la kunvenejon el la urbocentro aŭ el hoteloj, uzu la autobus-liniojn 1-an au 2-an. Por pliaj informoj skribu aŭ telefonu al Louis ENSUQUE (adreso maldekstre) Tel:67074262 laboreje, 67586418 aŭ 67402908 hejme antaŭ 22<sup>h</sup>. Montpellier Turisma Oficejo Le Triangle bas, Pl. de la Comédie Tel:67586758



AUTOROUTE MONTPELLIER - SUD →

# ALES

Gratulojn al Sro Henri Vigne, kiu, dum la lasta Universala Kongreso de Bergen (Norvegio) brile trapasis internacian ekzamenon de UEA.

## BEZIERS

Venontaj kunvenoj de la grupo:

-en Majo, pro la "pontoj", pro la Federacia kongreso kaj pro la staĝo en Agde fine de la monato, neblas antaŭvidi nian kutiman kunvenon. Do, ni renkontiĝos nur la 25an de Aprilo (sabato) je la 14a h30.

-en Junio, nova malfacilaĵo pro la kongreso en Verona. Laŭ interkonsento de la ĉestantoj en Marto, ni decidis organizi nian jaran piknikon en Caùduro, dimanĉon la 21an de Junio.

Nia amiko A. Sanz afable akceptos nin en Mondhejmo, kiu nun havas tegmenton! Komuna manĝo (eltirita el la sako) ĉirkaŭ tagmeze, sed estas konsilinde alveni pli frue.

CIUJ SAMIDEANOJ EL LA REGIONO ESTAS KORE INVITITAJ. Venu kiel eble plej multaj ĝui la bonan aeron de la kamparo apud St Chinian en Esperantujo !

\*\*\*\*\*

Du familioj de Heilbronn, la germana ĝemela urbo de Béziers, libertempos en Cap d'Agde de la 5a ĝis la 24a de Julio. Ili estus ege kontentaj renkonti esperantistojn (ili estas komen-cantoj). Ili vizitis Cap d'Agde lastjare, kaj, tie, jam rezervis loĝejon. Jam kelkaj grupoj de Béziers estas pretaj kaj feliĉaj konatiĝi kun ili. Ĉu aliaj de nia regiono havos eblecon pasigi kelkajn horojn kun ili? Estus bone.

\*\*\*\*\*

*(Dankon al la grupo de Béziers pro la duobla invito. Rilatu kun S-ino Authier (67311318), se vi volas partopreni. Same pri la lingva staĝo, eĉ se vi intencas nur parte ĉeesti. Manifestu vian solidarecon, apogante tiujn, kiuj organizas ion. Anticipan dankon !*

\*\*\*\*\*

Pri MONDHEJMO : Ekologia Centro Internacia kun Esperanto kiel oficiala lingvo.

Ni jam prezentis "Mondhejmo"-n en SFS kaj refaros, ĉar tiu asocio estas subteninda.

Senlace S-ro Sanz progresigas la konstruadon de tiu centro, kie oni povas nun renkontiĝi en kontentigaj kondiĉoj. La estraro konsistas nun el:

Prezidanto: Claude Cayzac, 700, Chemin de Bellevue 34820 Assas (tel. 67 59 55 74)

Vic-prezidanto: Louis Ensuque, 7, Rue Gustave, 34000 Montpellier (tel. 67 58 64 18/67 07 42 62)

Sekretariino: H. Asfaha, Fehmarn Str. 5, D 1000 Berlin

Kasisto: Akiles Sanz, Mondhejmo, 34360 Caùduro (Tel. 67 97 26 63)

La poŝtĉekkonto de MH estas 54118 V Montpellier

\*\*\*\*\*

*Ni gratulas la novajn elektitojn; C. Cayzac kaj L. Ensuque estas ankaŭ estraranoj de la federacio, kie ili aktivas kaj ni certas, ke MH baldaŭ fariĝos famkonata en Esperantujo. Bonan sukceson !*

\*\*\*\*\*

## → **ESPERANTO STAĜO --- 27-31 Mai 1992 --- AGDE ( HERAULT )**

Toutes correspondances / Ĉiujn korespondadojn : C.B.E. 9, rue Georges Picot 34500 BEZIERS

Tel. : 67 31 13 18 ou 67 31 13 46 ou 67 38 03 52.

Le stage aura lieu au Centre de Vacances "BATIPAUME", situé en pleine campagne, sur la route de Rochelongue à 2km d'Agde et de la mer. Entouré d'un parc de 8ha, ce Centre est un lieu de repos très agréable.

DATES : du 27 mai à partir de 16h., au 31 après-midi.

Prix : 160FF par jour soit 640FF pour le stage ( en chambre individuelle: 840FF). Apporter linges de toilette. On peut louer les draps sur place (25FF).

Cotisation: 100FF jusqu'au 30/04/92 - après cette date 180FF.

La staĝo okazos en "Centre de Vacances" BATIPAUME", situanta kamparmeze, sur la vojo al Rochelongue je 2km de AGDE kaj de la maro. Ĉirkaŭata de granda parko kun Arboj (8ha), la bieno estas agrabla ripozloko.

DATOJ : de la 27a de Majo ekde la 16a., ĝis la 31a posttagmeze

Prezo : 160FF tage do 640FF por la restado (840FF por individua ĉambro). Kunporti tualettukojn. Ebleco lui littukojn surloke (25FF)

Kotizo: 100FF ĝis la 30/04/92 - post tiu dato: 180FF.

## LA CANOURGUE + RODEZ :



Pluraj esperantistoj el ambaŭ lokoj partoprenos la Sat-Amikaran kongreson de Bordojo. Kiel jam indikite lastfoje, la temo estas: "De Mozart ĝis Eurokka-Muziko kaj E<sup>o</sup>-kompliceo de du internaciaj lingvoj".  
Solo, kiu koncertos en Bordojo, ankaŭ koncertos en la MJC de Rodez, ĵaŭdon la 16an de Aprilo.  
Informas Bernard Legeay : tel.65-67-10-72  
Pri la Bordoza kongreso informas Minitelo 3614 chez \* ekongreso.

\*\*\*\*\*



## MONTPELLIER

Lastaj kunvenoj: 08.01: diskutoj pri diversaj temoj  
05.02: belegaj diapozitivoj pri la Réunion kaj ĝia vulkana pejzaĝo prezentitaj de Odile Hamelin  
04.03: La Suda parto de Norvegio kaj Bergeno (lumbildoj de J. Bony)

### Venontaj kunvenoj:

01.04: Diskuto pri la organizado de la federacia kongreso en Majo  
06.05: Denove pri la Federacia kongreso kaj ludo (Geo)  
03.06: Diapozitivoj pri Egiptujo (L. Ensuque)

*kaj kompreneble la Montpellieranoj ĝojos akcepti vin la 16an kaj 17an de Majo. Ĝis !*

\*\*\*\*\*

DATOJ DE LA VENONTA INTERNACIA SEMAJNO EN SETE : de la 12a ĝis la 19a de Septembro

\*\*\*\*\*

La 11an de Aprilo, pluraj kluboj prezentos Esperanton en Lavérune, unue al klaso de CM2 dum la mateno, due al plenkreskuloj dum la vespero (18h).

**Lastminute: SOLO (Andaluzio) kantas kaj muzikos en la kastelo de LAVERUNE Sabaton, la 11an de Aprilo, je la 21a horo.**

\*\*\*\*\*

**PERKORESPOŬDA KURSO** : Sub la gvidado de Claude Cayzac (nova adreso en la rubriko \*\*\*\*\* "Mondhejmo", kies prezidanto li nun estas) daŭre funkcias la perkoresponda kurso. Nune ĝi havas 72 gelernantojn, inter kiuj 10 jara Rumano, geinstruistojn el Alĝerio kaj Togolando

\*\*\*\*\*

## NIMES

La teksto, kiun vi povas legi dekstre, aperis en la ĉiumonata "Libre Tribune", senpaga gazeto, kiu jam informis pri E<sup>o</sup>. Gratulojn al nia samideano. Ĉiu Esperantisto devus atesti pri siaj spertoj. Alia interesa ideo de S-ino Chaudouard; ŝi gluas en la angulon de kovertoj la ĉi-suban tekston. Mallonga teksto tiom efikas kiom parolado!

*L'espéranto est une langue naturelle et souple. Il est en mesure d'exprimer les nuances les plus subtiles de la pensée et des sentiments. Il est propre à permettre par conséquent l'expression la plus juste, la plus littéraire, la plus esthétique et de nature à satisfaire les esprits les plus ombrageux et les plus particularistes.*

*Il ne peut pas porter ombrage aux fidèles des langues nationales.*

Maurice GENEVOIX (de l'Académie Française)  
Le Jeudi 18 Février 1954.

Kiel jam indikite, 2 busetoj veturos al la kongreso de Verona; grupeto vojaĝos per trajno al la UK de Vieno; ankaŭ veturilo ebligas al kelkaj esperantistoj viziti la ekspozicion de Sevilla kaj tie renkonti la lokan grupon. Bonajn vojaĝojn!

\*\*\*\*\*

## A PROPOS DE LA LANGUE «ESPERANTO»

Cette langue existe depuis plus de cent ans. Pourtant beaucoup de personnes ignorent jusqu'à son nom. Cependant elle se répand lente-

ment à travers le monde et une langue de communication entre les peuples devient de plus en plus indispensable.

Il me plairait de parler de cette langue car son étude puis sa pratique m'ont procuré beaucoup de joies, des rencontres, des amitiés.

Des joies d'abord dans l'étude même de cette langue génialement construite, sans problème d'orthographe, sans exception grammaticale; enfin la plus facile des langues, mais une langue tout de même qui ne s'apprend pas sans peine.

Je voudrais donner ici un avis plus autorisé que le mien, celui de notre académicien Maurice Genevoix:

«L'esperanto est une langue naturelle et souple. Il est en mesure d'exprimer les nuances les plus subtiles de la pensée et des

sentiments. Il est propre à permettre par conséquent l'expression la plus juste, la plus littéraire, la plus esthétique et de nature à satisfaire les esprits les plus ombrageux et les plus particularistes.

Il ne peut pas porter ombrage aux fidèles des langues nationales.»

Si vous voulez vous informer sur cette langue et tout savoir sur elle, vous trouverez en librairie dans la collection «Que sais-je» l'Esperanto de Pierre Janton, professeur d'Anglais à l'université de Clermont-Ferrand, P. Janton enseigne aussi l'Esperanto. Si vous voulez pousser plus loin, procurez-vous toujours en librairie, l'Esperanto sans peine dans la collection «Assimil» et enfin sachez qu'à Nîmes il existe des cours gratuits d'Esperanto à Pablo Neruda, la maison de la Culture de Nîmes et à la maison de l'Europe, 1, Place du Château à Nîmes toujours. Il existe aussi un club récemment formé, le club UNESCO (enseignement de l'Esperanto). L'animatrice de ce club et des cours est Madame Gausson (Tél.: 66 81 14 94) F. Chaudouard, une esperantiste convaincue

# EŬROPA FESTO

6  
Gi okazos en Nîmes je sabato, la 9a de Majo. Kunlaboros por la E°-budo la grupoj de Nîmes, Uzès, Arles. Ĉeestos Esperantistoj el diversaj landoj de Eŭropo; partoprenos diversaj asocioj. Oni kantos la Eŭropan himnon je la inaŭguro. Eble ĉeestos ministro B. Kouchner. La premioj de la senpaga loterio estos pertrajna vojaĝo al Strasburgo, 2 aero-baptoj, staĝo (semajnfina) de E° pagita de la Garda federacio, ktp. Respondecas A. Gausсен.  
\*\*\*\*\*

**Anekdoto:** Caissargues, vilaĝo apud Nîmes (kie loĝas nia samideanino G. Soulier), estas ĝemeligita kun pola urbeto Kartuzy (je 30 km de Gdansk). Lastsomere la Asocio "Caissargues Jumelage", kies prezidanto estas la vilaĝestro, akceptis dum unu semajno grupon da Poloj. Ili prezentis sur la placo folklorajn dancojn, ekskursis ĉiutage. La gastigantoj vere dorlotis siajn gastojn, kiuj sin sentis kiel hejme.

Tamen io grava kaj malagrabla ŝvebis dum tiu mirinda restado: ilo mankis por interkompreniĝi. Ve! La Poloj ne parolis france, la Francoj ne parolis pole. Neniu konis esperanton.

Ĉe la foriro ili aspektis kiel mutuloj kaj nur pergeste adiaŭis unu la alian. Tristmiene, kun malsekaj okuloj, ĉiuj konsciis kaj bedaŭris, ke ili ne plu povos interrilati eĉ skribe kun siaj novaj amikoj.

Tamen ili rapide trovis logikan kaj taŭgan solvon al tiu lingva problemo. Ĉu vi povas diveni? 15 anoj de la asocio enskribiĝis al kurso pri la pola lingvo kaj konsilis al la Poloj lerni la francan... Dum kunveno, la vilaĝestro asertis, ke tiel la problemo estos facile solvita... La vorto "esperanto" efikis kiel fulmotondro: Profesorino pri la franca lingvo ekstaris kaj aroge diris, ke ŝi ne volas aŭdi pri esperanto, kiu ne estas kultura lingvo.

*Iom poste, S-ino Soulier skribis pri la dua akto:*

La Kurso pri la pola lingvo jam ne plu okazas. Verŝajne la lernantoj renkontis neantaŭviditajn problemojn kaj proprasperte tute konvinkiĝis pri la akreco de la lingva problemo.

*Ni nun atendas la trian akton! Intertempe S-ino Soulier kontaktis la E° polan asocion.*

*Eble estigis bona okazo por enkonduki esperanton*  
\*\*\*\*\*

*Dum la lasta baloto, S-ino Gausсен konsultis la lokajn kandidatojn. Krom unu, ĉiuj konfesis, ke ili nenion scias pri Esperanto... Vilaĝestroj ricevis opini-sondon pri la lingvo-problemo. Unu el la proponitaj solvoj estis la lernado de artefarita lingvo kiel esperanto, alia proponita solvo la lernado de la diversaj lingvoj de la Eŭropa komunumo... sinsekve!!!*  
\*\*\*\*\*

## PERPIGNAN

Pluraj gejunuloj daŭre sekvas la E°-kursojn. Iu intencas krei E°-grupon apud Font Romeu-Les Angles kaj konsultis tiucele la grupon de Perpignan.

En la urbaj arkivoj troviĝas nun tri pliaj kolektoj: unu kun poŝtkartoj pri la unua mondmilito, alia pri urboplanismo de Perpignan je la komenco de nia jarcento kaj la tria, nomita "fonds Amoureux", kun dokumentoj pri Esperanto.

Jean Amoureux daŭre kunlaboras kun "La philatélie française"; de tempo al tempo aperas tekstoj pri E°-temoj kun belaj koloraj ilustraĵoj. Ĉi-sube, en reduktita formato, ilustraĵoj de rusa poŝtmarko pri Popov, inventisto de radio, de brazila poŝtkarto plurlingva kaj de internacia specimena foiro en 1935 en Rio de Janeiro. Dank'al nia amiko, neniu esperantaĵo perdiĝas!  
\*\*\*\*\*



## Provenco

La Vaŭkluzo Federacio invitas vin al PRINTEMPA PIKNIKO en ISLE s/ SORGUE je la 10a de MAJO. La venonta kaj 9a RODANA E°-RENDEVUO ne okazos en Avignon sed en CARPENTRAS, kore de Vaŭkluzo, en loko nomita "Logis des jeunes du Comtat", sabaton la 17an kaj dimanĉon la 18an de OKTOBRO 92. Tri gradoj en la kursoj (la triagrada estos gvidata de G. Lagrange pri la temo: Raymond Schwartz). La kantistino Nikolin' animos la distran vesperon. Pliajn informojn skribante al Centre Culturel Esperanto B.P.136 84204 Carpentras Cedex.

\*\*\*\*\*

## Nice

La tiea grupo projektas aĉeti loĝejon ĉe la Lazura Marbordo, en Nico, por gastigi esperantistojn komferte kaj malpli multekoste ol en hoteloj. Eblas helpi al la konkretigo de tiu projekto. Detale informas: E° grupo-Les Hortensias 2 121, Bd Napoléon III. 06200 Nice.

<u>Enspezoj:</u>	
UFE (kotizoj)	1117,50 F
Libroservo (repago)	1605
SFS (parte por 92)	4065
Sparkaso (profito)	1275,19
La federacio posedis	
je la 31a de Decembro 90:23525,35	
-----	
Entute	31588,04 F
Do, restas.....	31588,04 F
	- 6995,60
	-----
	24592,44 F

<u>Elspezoj:</u>	
Vojaĝo de Sro Janton:	326 F
Anonco en gazeto	626
Internacia renkonto/Alès	500
Restado de junulinoj	135
Federacia kongreso	956
Restado de Ruso/Sète	950
ĉambro en Lazaret	220
SFS	3277,60
pĉk	5
-----	
Entute	6995,60F
	575,56
Sparkaso	24016,88
	-----
	24592,44 F

La kasistino : L. Négron

\*\*\*\*\*  
 OPERACIO "LICEOJ kaj KOLEGIOJ" :

La federacio decidis pli frue informi ĉiujn liceojn kaj kolegiojn de la regiono pri la ekzisto de Esperanto kaj proponi eventualan prezenton de E° al ĉiu lernejestro.  
 Ni dankas la gesamideanojn, kiuj bonvolis sendi la adresojn de ĉiuj liceoj/kolegioj. Ni nombris 153 liceojn kaj 232 kolegiojn en Langvedoko-Rusiljono.  
 Pri la liceoj, estas decidite : al ĉiu ni oferos la libreton de P. Janton pri Esperanto (kolekto Puf/Que sais-je?). La libretoj estas menditaj. Dum la federacia kongreso, ni ekdisdonos ilin al esperantistoj, kiuj bonvolos ilin porti al la respektivaj lice-estroj. Pri kolegioj, ni pridiskutos la sendotan dokumentaron.

\*\*\*\*\*

LERNI ESPERANTON : La Federacio proponas al vi staĝon en Agde fine de Majo, perkorespondan kurson; vi trovos ĉi-sube kelkajn aliajn eblecojn dum la somero.  
 Ni ĝojas anonci al vi, ke denove funkcios en 92 la Kultura Centro de La Chaux de Fonds. En Septembro okazos kiel ĉiujare la internacia semajno de Sète (vidu ĉe Montpellier)



**KULTURA ESPERANTO-DOMO**  
 "Gresillon"  
 F-49150 Bauge, Francio

**Kulturaj aranĝoj 1992**

La staĝoj disvolviĝas de posttagmezo ĝis mateno.

**Internacia Renkonto de Infanoj**  
 De la 18-a ĝis la 25-a de aprilo  
 (por infanoj, kiuj jam lernis la lingvon)  
 Kursoj, promenadoj, distraĵoj (la kursgvidantoj, kiuj deziras partopreni la staĝon, havos la eblecon kompari siajn spertojn).

**Internacia Amika Renkonto**  
 De la 24-a de junio ĝis la 9-a de julio  
 Nedeviga programo: kursoj, gvidataj konversacioj, komunaj promenadoj, ekskursoj, distraĵaj vesperoj.

**Prelegoj kaj kursoj**  
 De la 9-a ĝis la 22-a de julio  
 Temoj de la prelegoj: "Eŭropo", "Gresillon 40-jara". Kursoj por diverslingva lernantaro; gvidataj konversacioj, ekskursoj, distraĵaj vesperoj, libro-bindado (gvidos F. Moirand).

**Lernu, praktiku, perfektigu: seminario Cseh-metodo**  
 De la 23-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto  
 Kursoj por diverslingva lernantaro, gvidata konversacio, ekskursoj, distraĵaj vesperoj. La arto traduki (G. Lagrange), dum la unua semajno.

**Lernu, praktiku, perfektigu (II)**  
 De la 6-a ĝis la 19-a de aŭgusto  
 Kursoj por diverslingva lernantaro, gvidata konversacio, ekskursoj, distraĵaj vesperoj.

**Instruado kaj Instruhelpiloj**  
 De la 20-a de aŭgusto ĝis la 2-a de septembro  
 "Kiel vigle helpi la instruadon"; diverslingvaj helpiloj, didaktikaj materialoj, diversnivelaĵoj, kursoj, ekskursoj, distraĵaj vesperoj, korbotarado (gvidos Juanita Turbillon).

**La Kvinpetalo proponas**

Informas: Suzanne Bourot,  
 La Kvinpetalo, route de Civeaux, F-86410 Bouresse,  
 tel. +33-49-428074.

Ekde la 14a de Aprilo : akcepto kaj ebleco festi Paskon tradicie kaj esperante.

21-25 IV: Praktikado/Trejnado al la parola parto de Kapableco.

26-29 IV: Praktikado + turismo

8-13 V: piedaj ekskursoj en la regiono Poitou. Ebleco je iniciado kaj praktikado.

28-31 V: Verkista ateliero : proza verkado  
 Gvidos Giorgio Silber

1-5 VI: Renkonto de flaŭristoj

2-7 VII: Konatiĝo kun Poitou : romania arki-tekturo, legendoj, kuirarto.

10-15 VII: Preparado al la 4a kaj 5a ekzamenoj.

17-22 VII: "Apudbeletro " en E° (Ed. Borsboom) pri literaturo (Marjorie Boulton)

5-10 VIII: Tradukstaĝo/De Ronsard ĝis Desnos  
 Prozo kaj poezio

13-18 VIII: Pupfarado+kudrado (Marie Hunninck)

20-25 VIII: Kanzonoj. Skeĉoj (kun Tespa)  
 Voĉteĥniko

Aliaj staĝoj en Oktobro, Novembro, Decembro

AGDE: E°-staĝo - 27a-31a de MAJO.  
 \*\*\*\*\*

SETE: E°-semajno-12a-19a de SEPTEMBRO.  
 \*\*\*\*\*

# TOULOUSE

8

Jus aperis ĉe Eurokka "Kased/disk-distribua katalogo". La dupaĝa katalogo referencas ne malpli ol 15 kasedojn, 5 kompaktdiskojn, 2 diskegojn kaj 3 disketojn. Bonege!  
Vi povas ricevi tiun katalogon de "Eurokka 31450 Donneville tel:61.81.95.65) aŭ de SFS (en ambaŭ kazoj kontraŭ aŭ frankita koverto)

\*\*\*\*\*

Samtempe aperis la tria n° de "Rok-Gazet". Presita sur luksa papero kun multaj fotoj kaj desegnaĵoj, ĝi estas plaĉa sed enkonduke "Flo" ne kaŝas problemojn pri la estonteco. Jen parto de tiu enkonduko:

La esperantistaro seniluziigis nin pro ĝia apatio kaj malfidemo.

Rimarkindas ke malmultaj revuoj por Esperanto-junularo ekzistas, kaj ni miras ke eĉ tiel malmultnombraj ili ne havas pli da subteno.

Eble la E-movado atendas ke ili malaperu por diri: Ho jes, ili estis subtenindaj; sed tro malfrue. Ofte kaj preskaŭ ĉiam oni tro malfruas pri tiuj aferoj.

Mi ne diras tion nur ĉar ni eldonas Rokgazeton, sed ĉar la E-junularo bezonas revuojn por si mem en kiu ĝi trovas interesajn kiuj utilas ankaŭ por pliinteresi novajn junajn E-lernantojn, kaj kiel vi jam certe scias, tro da mono ĉe gejunuloj malofte.

Laŭ mi - kaj kalkulo -, E-revuo por junuloj estas tiom malmultaj ke ili estas subtenendaj, kvankam kelkaj membroj de TEJO pensas la malon kaj diras ke TEJO ne povas subteni ĉiun gazeton kiu povas interesi junulojn. Mi esperis ke TEJO estas junulara organizo... Cetere, EUROKKA fariĝis fakasocio de TEJO.

Antaŭ nelonge renaskiĝis JEFO kaj TEJO estas reorganizita sed ĉu tio sufiĉas por savi "Rok-gazet"? Jes ja, esperantistoj devus, devas helpi tiun iniciaton sed ĉu ne estas tro multaj riskoj pro nesufiĉa klientaro, pro transpagaj problemoj, pro tio ke maljuna esperantistaro ne speciale ŝatas rokmuzikon, ktp? Abono al "Rok-gazet" kosta 100F kaj estas rekomendeble abonigi junulon en nepagipova lando.

\*\*\*\*\*

## ARIEGE

Kiel resumi sur duon-paĝo la malfruajn kaj plurpaĝajn informojn el tiu departemento, kie aktivas nia amiko Jorgos? Ne eblas! Felice renaskiĝis "E° Ariège", kiu detale raportos. La gazetaro raportis pri la 2a Ĥoro-staĝo okazinta en Februaro kaj la koncerto en Montferrier. Gvidis la staĝon Saskia Idzerda (NL), prezidantino de TEJO. Aliaj staĝoj estas planitaj: -de la 17a ĝis la 24a de septembro 92 kaj de la 21a ĝis la 28a de februaro 93 en La Freychède.

Alia longa intervjuo aperis en "La Croix du Midi" pri Esperanto kaj ĝia nuna situacio.

Ni ankaŭ menciu prospekton pri E° en Ariège. Ĝi enhavas liston de la kursoj en la departemento, ĝeneralan priskribon de E°, atestojn de esperantistoj (eble pli interesa ideo ol listigi la uzeblecojn de E°), la unuan lecionon en E°, pagitajn anoncojn... kaj aliĝilon al CEEA.

\*\*\*\*\*

Printempo de la junuloj en Arjeĝo:

En ĝia kadro disvolviĝos pluraj E°-programeroj:

Esperanto kaj muziko

- vendredon, la 24an de Aprilo en Laroques :4a nokto de "Video'lmes" kun Andaluzia esperantista muzikisto "Solo" (gimnastikejo ĉe MJC)
- sabaton, la 25an de Aprilo en la nova centro de Saverdun, pri la temo: "junuloj kaj kulturoj en Eŭropa Sud-okcidento, pluraj aranĝoj kun "Solo" (sinteziloj kaj voĉo) el Andaluzio, "Irrintzi" (tradiciaj instrumentoj) el Eŭskio, "KTP" (gitaroj, flutoj) el Katalunio, folkloro grupo portugala, "Aigarella" (folk-grupo) el Okcitanio...

Ankaŭ debato, ekspozicio de plurlingvaj vortaroj, granda "paëlla", ktp  
Informas Jorgos (tel. 61.608.683)

## JO+JO

\*\*\*\*\*

aŭ kiam JOrgos renkontas JOspin, la eksministron pri edukado:

Eĉ se la anekdoto ne plu aktualas, ĝi eble pripensigos vin. Parenteze la nova ministro pri edukado, Sro Lang, estas urbestro de Blois, kie antaŭ nelonge okazis nia nacia kongreso. Tiam Sro Lang montris sian intereson per malĉeesto...

Fine de Februaro venis Sro Jospin al Saverdun por la inaŭguro de nova kultura centro.

S-ino Couret, urbestrarano pri kulturo en Saverdun, al la ministro:

-Mi prezentas al vi S-ron Comte (Jorgos), kiu instruas esperanton en la MJC de Saverdun.

Nu, E° ne estas mia afer'... mi pli precipe okupiĝas pri klasikaj lingvoj.

Jo: -Ankaŭ ne mia afer' estas E°. La Esperantistojn mi bone konas... Ili estas portantoj de volo preterpasi la aliajn lingvojn...

Jo: -...dume ilin protektante...

Jo: -sed tio pluestas ege marĝene...

Jo: -Sufiĉus eta fingro-puŝo.

Jo: -Oni ne povas decidi anstataŭ la homoj. Pardonu, mi parolu al alia persono...

\*\*\*\*\*  
\*\*\*\*  
\*\*





Task Force  
Ressources humaines,  
éducation, formation et jeunesse



De Europæiske Fællesskaber  
EUROPA-PARLAMENTET  
Europäische Gemeinschaften  
EUROPÄISCHES PARLAMENT  
Ευρωπαϊκές Κοινότητες  
ΕΥΡΩΠΑΪΚΟ ΚΟΙΝΟΒΟΥΛΙΟ

European Communities  
EUROPEAN PARLIAMENT  
Comunidades Europeas  
PARLAMENTO EUROPEO  
Communautés Européennes  
PARLEMENT EUROPÉEN

Comunità Europee  
PARLAMENTO EUROPEO  
Europese Gemeenschappen  
EUROPEES PARLEMENT  
Comunidades Europeas  
PARLAMENTO EUROPEU

René Llech-Walter et Yvette Vierne ont reçu une réponse à leurs courriers. Au nom du Président Delors, il a été répondu à R.L-W. que "le mouvement espéranto peut contribuer au rapprochement des peuples d'Europe et du monde, et c'est une noble tâche à poursuivre. Toutefois, c'est l'apprentissage des langues vivantes des peuples voisins et partenaires qui est d'après nous le meilleur moyen pour intensifier la coopération culturelle, économique et sociale dans la Communauté"... C'est, à peu de choses près, ce que M. Delors avait répondu à une question écrite d'un député européen, mettant en avant dans les 2 cas le programme "Lingua".

Y.V. a été informée au nom du Secrétaire Général du Parlement européen que sa lettre avait été "inscrite au registre général des pétitions et transmise à la commission... qui examinera d'abord si la pétition entre dans le cadre des activités des Communautés européennes". Ce serait surprenant que ces dernières ne soient pas concernées par le problème linguistique! La campagne n'est pas terminée : JEFO a décidé de s'y joindre. Et vous?

\*\*\*\*\*

**Tradukistoj en EEK, en 1991**

	Entuta nombro da konstantaj oficistoj	nombro da lingvaj oficistoj	% de la lingvaj oficistoj kompare a la tuta oficistaro
